



Enhavo

- Niaj blinduloj fortas en Eŭropo
- ILEI kaj preparoj en Skotlando
- Celoj por la AMO-programo
- Programo por AMO 68 – Eo-Centroj

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2020-49 sendita el Budapeŝto, la 17an de oktobro

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

Nia blindula Fakula Asocio havas mirindan etendiĝon

Verŝajne multaj el vi ne konscias la vastan etendiĝon de LIBE tra Eŭropo. EKO strebas korekti tion. Eĉ la Jarlibro ne konigis tion, kvankam ĝi pretintus. Pli da informoj pri LIBE ĉe: <http://www.libe.slikom.info/index.htm>

Jen la nuna listo de la 25 delegitoj por LIBE, kiu same peras ilian brajlan revuon:

Aŭstrio: Harald Rader, FeldKirchen, r.p.: harald.rader@aon.at .

Bosnio-Hercegovino: Miroslav Djajiĉ, Prijedor; bastono@teol.net kaj ljljja@pd.elta-kabel.com .

Bulgario: Stanĉev Stojan Minĉev, Varna, [stanchev19\(heliko\)abv.bg](mailto:stanchev19(heliko)abv.bg) .

Ĉeĥio: Jan Priborsky, Olomouc, priborsky@volny.cz kaj priborsky@brailnet.cz .

Danlando: Lars Pilegaard, Soroe, larspil@stofanet.dk.

Finnlando: Ritva Sabelli, (vidanta sekretariino), Helsinki, steleto@pp.inet.fi

Francio: Jacques Charlin, Villeurbanne, jacques.charlin@adm.univ-lyon1.fr .

Germanio: Ursula Heiden: Kiel; tel.: +49(431)673217

Hispanio: Pedro Zurita Fanjul (provizora delegito), Madrid, pedrozuritanfanjul@gmail.com

Hungario: Varro Attila, Budapest, [a.varro\(heliko\)chello.hu](mailto:a.varro(heliko)chello.hu).

Italio: Prof. D-ro Aldo Grassini: Ancona, aldograssini1@tin.it kaj aldograssini.ancona@libero.it .

Japanio: Tanabe Kunio, Hino, tanabe0926@nifty.com.

Kroatio: Prof. Antun Kovaĉ, Zabreb, antun1946@gmail.com kaj antun2805@gmail.com .

Moldavio: Victor Varzari, Tiraspol, varzarivictor@rambler.ru

Nederlando: Bep van Houwelingen, Naarden, bepvanhouwelingen@hetnet.nl

Norvegio: Tormod (Otto) Prytz, Hovseter, Oslo, torpryt@online.no

Pollando: Pawel Wilkniewski, Poznan, pawilki@o2.pl kaj lidiapiechowicz@o2.pl

Portugalio: Joaquim Lagartixa, Mora, jlagartixa@sapo.pt .

Rumanio: Livi Ciobanu, Moinești, Bacau, poŝtel.: +40 745012446

Rusio: Anatolij Masenko, Kislovodsk, masenkoai@mail.ru

Serbio: Nedeljka Lozajiĉ, Beograd, nedeljka.lozajic@nb.rs (ofica),



nedeljkalozejic@gmail.com (hejma).

Svedio: Mats Landfors, Sundsval a.m.landfors@bredband.net

Svislando: Luciano Orтели, Horw; l.ortelli@vtxmail.CH kaj lortelli@bluewin.ch

Ukrainio: Olena Poshivana:Dnipropetrovsk, amatalena@ukr.net

Usono: Irena G. Franchi, Sunny Isles Beach ([verŝajne 'Beach'](#)), ifranchi@bellsouth.net .

El ili 23 havas retadresojn. 23 el 25 troviĝas en Eŭropo, kaj estas altaĝaj. LIBE havas delegiton en lando, kie UEA entute ne havas membron kaj en alia, kie la LA de UEA ne funkciis tra la lastaj 8 jaroj.

LIBE kompilas adresaron de personoj, kiuj plejparte estas blindaj aŭ viddifektitaj, sed ankaŭ inkluzivas subtenantojn. Tio indikas 361 adresojn en 35 landoj – laŭ laboro de s-ro Masenkoen Rusio en 2020. Tio aldonas homojn en Kongo DR (11 personoj), Kanado (2 personoj), Belorusio (2), Kubo (1), Brazilo (3), Estonio (5), Irano (1) kaj Litovio (1).

Ni povos esperi, ke iuj el tiuj landoj fariĝos delegitoj, ĉar LIBE urĝe bezonas tutmondigon kaj ioman reunigon. Ĉiukaze, la Asocio bezonas plian subtenon, ankaŭ de UEA, kies aliĝinta faka asocio estas LIBE.

Progreso ĉe la Universitato de St Andrews, Skotlando

St. Andrews estas la plej renoma kaj longviva universitato de Skotlando.

Legu pri tio ĉe:

<https://www.liberafolio.org/2020/05/18/esperanto-allogas-esploristojn-pri-internaciismo>
<http://standrewstransnational.wp.st-andrews.ac.uk/research/esperanto-and-internationalism-c-1880s-1930/>

Prof. Bernhard Struck informas nin, ke la centro de Esperanto-studoj ĉe la Universitato de St Andrews bone progresas. Ĉiuj tri unuajaraj doktoriĝaj studentoj faris konsiderindan progreson: Marcel Koschek, kiu esploras pri Varsovio kiel ĉefloko, lokaj kaj transnaciaj retoj, kun ĉefa fokuso al TEKA kaj kuracistoj; Pilar da Lamo Requero pri Katalunio kaj la Ibera Duoninsulo, Esperanto kaj naciismoj en tiu regiono; kaj Manuela Burghela, kiu faras ciferecajn esplorojn anstataŭ surloka laborado en Rio-de-Janejro, ĝis sekura vojaĝado eblos. La grupo organizis iom da kunvenoj antaŭ la kronviruso, kaj poste rete per Zoom kun la



Glasgova Esperanto-klubo, bonvenigante prezenton de Guilherme Fians en Manĉestro. Mallonga intervjuo pri la agado de la grupo aperis en Libera Folio (vidu supre). En oktobro Prof. Struck faros prezenton pri Esperanto, en Litovio kaj en Prago, kaj la projekta grupo prezentos ĉe le Edinburga kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) en julio 2021. Marcel Koschek kaj Struck prezentos en Varsovio fine de oktobro 2020.

[Peris Mirejo Grosjean](#), prezidanto de ILEI

Poezia konkurso ankoraŭ alirebla

La konkurso "Poezio el ĉiuj ĉieloj" (<https://www.iconcorsidisamideano.it/poezio-el-ciuj-cieloj-sesa/>) estas prokrastita (pro la kronoviruso) ĝis la 30-a de novembro 2020. Por la kondiĉoj de partopreno, vizitu la retejon.

Nicola Morandi, Pistoja Esperanto-Grupo

FB: <http://eo-eo.facebook.com/people/Nicola-Morandi/1614444935>

IP: <http://www.ipernity.com/home/77436>; Skype 'nikmorand', <http://www.esperanto-grupo.it>

Celoj por la AMO-programo

Pro la kunlaboro inter TEJO kaj AMO por la novembro-fina seminario.69 pri varbado de junuloj en Eŭropo, TEJO petis min (SMG) difini la celojn de AMO. Jen mia provo:

1. Liveri efikan aktivulan trejnadon – kampo en kiu TEJO havas sperton
2. Diskutigi la nunan staton de nia komunumo kaj la perspektivojn
3. Analizi ĝiajn fortojn kaj malfortojn (FLAM-analizo)
4. Reliefigi la ĉefajn defiojn kaj laborkampojn por la movado.
5. Formuli rekomendojn por konsili la ceteran movadon, precipe tiun parton kun aliro al rimedoj.



La Flamo
de l'
AMO

Aktivula trejnado gravas kaj utilas kaj formas gravan parton de la taskaro de AMO. Sed multa publiko ja ne volas tian trejnadon, sed jes volas diskuti kaj analizi la situacion de la movado kaj proponi solvojn. Ankaŭ ili rajtas partopreni en la AMO-programo!

Detala programo por AMO 68 pri Esperanto-Centroj

Temo: La rolo de Esperanto-Centroj

Datoj: Okt 27 kaj 29 (marde kaj ĵaŭde), inter 16:00 CET kaj 18:30

Programo okt 27

16:00 Malfermo kaj enkonduko (SMG per Zoom, sed nur voĉe)

16:15 Lee Jungkee, pri la Eo-Centro en Seulo, Koreio

16:40 Zsafia Korody pri la Centro en la Eo-urbo, Herzberg am Harz, Germanio

17:25 Malgosia Komarnicka (Wroclaw) pri la Eo_Centro en Wroclaw, Pollando

18:15 Fina diskuto (SMG), fino de 18:30

Alvoko por pliaj kontribuoj de pliaj Centroj petitaj per EKO 48 – irintaj al ĉ. 2000 adresoj.

Programo okt 29

16:00 Taga enkonduko (SMG).

16:10 Adeline Umutoni, pri Eo-Centro en Ruando

16:55 Prezento pri la Eo-Kulturcentro Greziljono.

17:40 Diskuto aŭ forumo plus kompilo de enketilo por Eo-Centroj (ĉiuspecaj). Ĝis 18:30.

Fizika loko: Kulturcentro Greziljono, teknika prizorgo: Irano.



La Eo-Centro Greziljono – serve al Esperanto tra jardekoj



Kurso en la Eo-Centro de Seŭlo. Centre lokita – ege alirebla – krom la ŝtupara grimpo ĝis la sesa etaĝo!

==== Vortoj: 815 ====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.